




KIEL ALVENI ?

La loĝejo situas apud la aŭtovojo A16.

Se vi venas el Parizo, veturu je la eliro 28 «Isques, Samer». Kiam vi estas en Isques (RN1), antaŭ la magazeno BUT, turnu dekstren kaj sekvu la vojtabulojn «Gîte rural».



Se vi venas el Calais kaj ne deziras pagi la aŭtovojon, eliru je la eliro «Outreau», sekvu Saint-Léonard kaj poste Isques (RN1). Vi transveturas Isques kaj post la magazeno BUT, turnu maldekstren kaj sekvu la vojtabulojn «Gîte rural».

Bonan vojaĝon !

FIŜA SEMAJNFINO 1A DE APRILO

De la 31a de marto ĝis la 2a de aprilo 2006



En la unua fiŝhaveno en Francio okazos la fiŝa semajnfino. Post vagado tra la vendistoj de ĵus kaptitaj fiŝoj sur la kajo, vi malkovros la belecon de sovaĝa marbordo, de krutaj klifoj ĝis sablaj dunoj. La malnova urbo alportos al vi la ĉarmojn de la mezepoko interne de la remparoj per la katedralo Notre-Dame kaj la kastelo. En tiu gastejo meze de la bulonja kamparo, vi povos gustumi kelkajn fiŝajn pladojn.

PROGRAMO

Sabate: 5a : vekiĝo je la sono de la klariono
5a – 5:30a : Matina gimnastiko
5 :45 – 6a : senŝlimigado de stalfakoj (por redukti prezojn)
6a : Ek piediri ĝis strando
7a – 12a : Transnaĝado de la Maniko kaj premiado
12:30a : Gastronoma angla manĝo
14a : Remkonkurso kontraŭ teamo de Oksfordo (transveturo de la Maniko)
15a – 18a : Lernado de la 13 unuaj literoj de la PIV kaj trejnado al internacia konkurso pri traduko klingono-esperanto
18:30a : Manĝo per plado de vivantaj polpoj
19:15a: Lavado de teleraro kaj nutrado de gripa kokaro

Dimanĉe : 5a : vekiĝo je la sono de la klariono
5a – 5:30a : Matina gimnastiko
5:45 – 6a : senŝlimigado de stalfakoj (por redukti prezojn)
6a : Trejnado de 60 kilometroj (Bulonjo-Calais-Bulonjo) por pli granda promenado de la 31a ĝis la 35a de aprilo inter Bulonjo kaj Bialystock
12a : Manĝo ĉe la fama restoracio «Ze Café Franglais» kun mituloj kaj fromaĝo «Maroilles»
13:30 – 16a : Sekvo de la lernado de la PIV
16a – 17a : Internacia konkurso de traduko Esperanto-Klingono direktanta de Ludoviko Lazaro Zamenhof
17a – 18a : Purigado de la loĝejo per dentobrosoj

La programo povas esti ŝanĝita...

ALIĜILO

Persona nomo : _____

Familia nomo : _____

Naskiĝdato : _____

Strato : _____

Urbo : _____ Poŝtkodo : _____

Lando : _____

Telefono : _____

Retpoŝto : _____

Mi deziras manĝi : Vegetare Ĉiovore (fiŝo)

Prezo	Antaŭ la 15a de marto	Post la 15a de marto
Malpli ol 26 jaroj	55€	60€
Pli ol 26 jaroj	60€	65€

Mi do devas pagi : _____

Antaŭpago : 10€

Mi sendas mian antaŭpagon per UEA-Konto jefo-v
Ĉeko
Ĝiro

Bonvolu sendi ĉekon al Julia Hédoux,
45 avenue Charles de Gaulle, 62200 Boulogne-sur-mer
aŭ kontaktu min al julia@esperanto-jeunes.org